# 3. Pensi pri amo

Dum kelkaj jaroj Katrina studis. Ŝi studis por esti instruisto. Nun ŝi ne plu studas, sed eklaboris post la studoj. Ŝi estas instruisto. Ŝi instruas infanojn en granda lernejo. Ŝi havas klason el dudek kvin lernantoj.

Aŭtune, vintre kaj printempe Katrina studis. Sed somere ŝi ne studis. En la someroj ŝi unue laboris, kaj poste vojaĝis. Ŝi ŝatis vojaĝi al aliaj landoj. Antaŭ kelkaj jaroj ŝi renkontis junan viron en Germanio. Lia nomo estas Bruno. Ŝi ekamis lin. Ŝi jam amis aliajn virojn antaŭ li, sed Bruno estis neforgesebla. Ŝi ne multe renkontis lin. Nur kelkfoje. Tamen ŝi ne povas forgesi lin. Sed la lasta renkonto ne estis bona. Jes, bona – sed ankaŭ malbona. Okazis aferoj bonaj kaj malbonaj.*) Nun ŝi ne volas pensi pri tio. Li ne plu amas ŝin. Li havas alian amikinon. Ĉu Katrina plu amas lin? Eble – eble ne. Ŝi nun ne havas tempon pensi pri tio. Ŝi devas multe labori. Por nova instruisto ne estas tempo por pensi pri amo.

Tamen ŝi pensas pri amo. Ŝi ne havas tempon, kaj ŝi ne volas pensi pri ĝi, sed ŝi devas pensi pri ĝi. Pri Bruno. La pensoj de Katrina mem iras al li. Kaj poste la pensoj iras al *ŝi*. Al Franciska, la alia amikino de Bruno. Katrina faris al Franciska ion malbonan. Tion ŝi ne povas forgesi. Ŝi volas forgesi, sed tio ne eblas. Nun ŝi tamen devas pensi pri io alia. Pri la laboro. Ŝi devas prepari lecionon de la sveda lingvo por morgaŭ. Ŝi devas elpensi taskojn al la lernantoj. Ŝi planas lecionon pri la akuzativo. Ŝi devas prepari ekzemplojn. "Mi amas lin. Li amas ŝin." Stulte! De kie venis tiu stulta ekzemplo?

Katrina pensas pri somero, pri vojaĝoj, pri amo. Ŝi ne havas tempon pensi, sed ŝi ne povas ne pensi. Ŝi ne havas tempon ami, sed ne eblas ne ami.

*) Vidu: *La krimo de Katrina,* la unua rakonto pri Katrina.

## Glosoj:

akuzativo [E] .............. n-formo / *accusative* / 対格
ekzemplo [B] .............. io, kion oni imitu; unu el similaj / *example* / 例，例文
el-pensi [A] ................trovi aŭ krei per la pensoj / *invent, think up* / 考え出す
forgesi [B] .................. malmemori / *forget* / 忘れる
leciono [Ĉ] ................. parto (pli-malpli horo) de instruado / *lesson* / 授業
lern-anto [B]................ iu, kiu lernas / *pupil* / 生徒
ne-forges-ebla [B] ...... tia, ke ne eblas forgesi lin / *unforgettable* / 忘れられない
prepari [C].................. fari tion, kio estas necesa por povi komenci fari ion / *prepare* / 準備をする
printempo [C] ............ sezono antaŭ somero / *spring* / 春
stulta [C]...................... nebone pensanta, malinteligenta / *stupid* / おろかな，ばかげた
tasko [C]...................... io, kion oni devas fari / *task* / 課題
vintro [Ĉ]..................... mal-somero / *winter* / 冬